

ESPERANTO

TRIUMFANTA

Internacia

SEMAJNA

Neŭtrala

Abonon ĉiu pagas laŭ la taga kurzo de sia propra valuto, se eble per ŝtataj monbiletoj en rekomendita letero, eventuale per ĉeko sur germ. banko, sed ne per poŝtmandato. Abonantoj, kies abono estas finiĝonta, ricevas ĝustatempe admonilon. Abonoj povas esti komencataj per iu ajn numero.

Por Abono oni sendu laŭvole altan sumon, kaj ni liveros tiom da numeroj, por kiom valoras la pago. — Prezo de unu numero: 0.06 dolaro, 0.15 guld., 0.24 sved. kr., 0.50 sviz. fk., 0.50 dana aŭ norvega kr., 0.50 peseto, 5/8 pencoj, 0.50 fr. aŭ belg. fk., 0.70 liro, 1.20 fmk., 1.40 ĉ. kr., 15 hung. kr., 80 pol. mk., 400 aŭstr. kr.; Germanoj abonu je favorprezo ĉe sia poŝtoŭficejo; balkananoj kaj baltikanoj demandu la abonprezon ĉe la Abonejoj; alivalutoj pagas samvaloron de 0.50 franc. fk. aŭ unu stamp. resp.-kup. —

Liston de niaj Abonejoj vidu sur paĝo 41. Por Adresaĝoj ni devas kalkuli la prezon de 2 numeroj. Dumviva Abono kosas la prezon de 400 numeroj. Abono al la Literatura Aldono (aperanta ne-regule) estas nedeviga. Du Literatura Aldonoj kostas la prezon de unu numero de ET.

Abonojn al nia Literatura Aldono ni petas tuj, por ke ni povu konstati la bezonon nombron da ekzempleroj.

ELDONANTOJ:
D-ro L. Zamenhof, Warszawa (Varsovio)
W. M. Page, adv., Edinburgh
Ernest Archdeacon, Paris
J. Gili Norta, Barcelona
Teo Jung, Köln (Kolonjo)
Frans Schoofs, Antwerpen
P. v. Medem, bankdirektoro, Kaunas (Kovno)

REDAKTOROJ:
Ĉef-redaktoro: Teo Jung.
Kun-redaktoro: M. Butin.
Literatura red.: Zanoni.

ADMINISTREJO:
Horrem bei Köln, Germ.
Poŝtekkonto Köln 70663, por Teo Jung, Horrem.

ANONCOJ
po cm² 0.10 sviza franko (aŭ ĉe antaŭpago 15 gmk.)
Rabato laŭ interkonsento.

Numero 102 :-: Antwerpen, Barcelona, Edinburgh, Kaunas, Köln, Paris, Warszawa :-: 17. Septembro 1922.

Monumento Zamenhofa.

Raporto de la Honora Sekretario J. D. Applebaum al la XIV-a Universala Kongreso de Esperanto en Helsinko-Helsingfors. Aŭgusto 1922.

De kiam la Kongreso en Praha en 1921 aprobis la rezolucion pri neceso de la monumento, la Organiza Komitato deŭre sin okupis pri la laboro.

Oni memoros, ke dum la Kongreso en Praha la Organiza Komitato invitis kritikojn, konsilojn kaj sugestojn pri la starigo de la monumento. Krom du poŝtkartoj senditaj de individuaj Esperantistoj kaj unu artikolo aperinta en certa Esperanta ĵurnalo, kiuj enhavis malaprobajn esprimojn pri la ideo de monumento, la Organiza Komitato ricevis multajn leterojn de varma aprobo al la afero kaj promesojn de helpo por sukcesigi la projekton. Inter tiuj, kiuj promesis sian apogon kaj helpon ĉiurilate, sin trovas la prezidantoj de la sekvantaj naciaj asocioj: Belga Esperantista Ligo, Brita Esperanta Asocio, Centra Dana Esp. Ligo, Germana Esp. Asocio, Itala Esp. Federacio, Nederlanda Societo „La estonto estas nia“, Franca Societo por Propagando de Esperanto, Kataluna Esp. Federacio, Universala Esp. Asocio, Esperanta Grupo de Lyon kaj Finnlanda Esp. Asocio. Depost la apero de reklamoj pri la kompletigo de la kupon-kartoj, ni ricevis postulojn por ili de la sekvantaj aldonaj lokoj: Grupo de Zagreb, Jugoslavio; Klubo „Dr. Schultof“, Pardubice; Brazila Ligo Esperantista; Grupo „Frateco“, Varna; UEA-delegito en St. Omer; kaj de Estonia Federacio Esperantista. Tio montras, ke la tutmonda Esperantistaro akceptis la rezolucion de Praha kun unu-animeco kaj senrezerve aprobas la projekton.

La ĉefa laboro post la Praha decido devis esti la forta antaŭenpuŝo de la monokolekto per la sistemo de kupon-kartoj, laŭ la elkizita plano. Tion la Organiza Komitato komencis ĉe la fino de la jaro 1921 pro diversaj kaŭzoj. Tiuj estis: la grava mondkrizo dum tiu periodo, la subita falado de la mezŭropa monkurzo, manko de laboro kaj negoco en la bonvalutaj landoj, kaj la alvokoj elsenditaj en ĉiuj landoj por la malsatantoj en Rusujo. Oni rajtis esperis, ke la krizo estos nur protempa, kion bedaŭrinde la faktoj ne montris. Je la komenco de la nuna jaro do, la Organiza Komitato decidis daŭrigi la laboron kaj eldoni la kupon-kartojn laŭ plano. Ne estis facila afero, trovi taŭgan desegnon por la kupon-karto kaj pliposte decidi pri la stilo kaj la arto de la eldono; la gustoj de la Esperantistaro kaj la kosto devis esti konsiderataj tre zorge, kaj tio kaŭzis ankoraŭ kelkan prokraston. Oni tamen ne pensu, ke neniu progreso estis farita, la nuna stato de la afero estas jena:



Modelo de la Kupon-Kartoj.

Ni fine sukcesis trovi tion, kion ni serĉis por la kupon-kartoj, ni eldonis ilin, kaj ni esperas, ke ili plaĉos al la samideanaro.

En Varsovio la loka por-monumenta komitato, kiun ni starigis, sukcesis varbi la valoran helpon de la Varsovia „Asocio de Skulptistoj“ (plej famaj profesoroj de Skulptista Akademio) pri starigo de taŭga monumento. Tiu Asocio kune kun la Loka Komitato publike anoncis konkurson por desegno por la monumento kaj proponis premiojn, l-an de 12 pundoj sterlingaj kaj l-an de 6 pundoj sterlingaj, pagotaj el la monumanta kaso. La konkursaĵoj estos sendataj al la „Artista Societo“ en Varsovio antaŭ la 1-a de septembro, kaj la premioj estos aljuĝataj tuj poste de juĝkomitato konsistanta el tri artistoj-skulptistoj kaj du membroj de la Loka Komitato. Oni celos preligi la monumenton por la somero 1923, kaj se la XV-a Kongreso de Esperanto okazos en Varsovio*, tiam la tutmonda Esperantistaro havos tre oportunan okazon malkovri la monumenton sur la tombo de la Majstro.

La financa flanko ne estas tute malkontenta. Kvankam la kupon-kartoj eldoniĝis nur dum la lasta monato, la kaso ne estas malplena; ĝi posedas iom da mono kaj havas promesojn de multaj samideanoj, kiuj nur atendas alvokon por pagi siajn ŝuldojn. Ni jam pagis 20 pundojn sterlingajn por la konkurso al la Varsovia komitato. La fakto estas, ke necesas nur malgranda antaŭenpuŝo por havigi ĉion, kion ni bezonas por la surtomba monumento. Sed la opinio de la Internacia Komitato estas, ke ni devas ne halti ĉi tie. Monumento sur la tombo estu nur komenco de nia laboro; ni povas daŭrigi la monokolekton per la sistemo, kiun ni organizis, kaj uzi la monon por alia memoriga celo. La monon, kiun ni povas kolekti de la tutmonda Esperantistaro, ni povos tre bone utiligi aparte de la surtomba monumento. Kun la aprobo de niaj kongresoj kaj samideanaro, kiujn ĝi oficiale reprezentas, ni havas la rajton postuli materialan subtenon de ĉiu Esperantisto kaj kunsimpatiano, kaj tion la Organiza Komitato ne hezitos fari.

Pri la reklama flanko ni ne plu devas fari tre multe. La ideo pri monumento ricevis jam grandan reklamon per la akcepto de la rezolucio en Praha, kaj per multaj artikoloj aperintaj en la diversaj Esperantaj gazetoj antaŭ kaj post la kongreso de Praha. Mi prenas ĉi tiun okazon por danki en

* Laŭ decido de la XIV-a la XV-a nun okazos en Nürnberg; sed supozeble en Varsovio okazos la XVI-a. (Rim. de Red.)

Nia Literatura Manuskriptaro.

Por ke la sendintoj de manuskriptoj sciu, ĉu iliaj manuskriptoj aperos aŭ ne, ni de nun donos de tempo al tempo sciligojn pri aperontaj kaj neaperontaj manuskriptoj.

1. Certe aperontaj manuskriptoj.
17. Valorajoj (P. Ivanov).
 18. Mensogeĉjo (Moriz-Papp).
 19. Fabeloj (Scheitler-Trarbach).
 20. La kanto (Zivanoviĉ).
 21. Homo (Poruks-Strazde).
 22. Kredo (Esna).
 23. Ĉerca instruoj (Heine-Pfeffer).
 24. Nova kanto (Heine-Pfeffer).
 25. La agloj (Machar-Pfeffer).
 26. Infankanto (Kolĉin).
 27. Mia kanto (Esk).
 28. Malvivaj animoj (Gogol-Rublev).
 29. Kiel mi aranĝus mian vivon (Mexin).
 30. Brua la arbaro (Umanski).
 31. Agordo (Baghy).
 32. Serenado (Baghy).
 33. Peto al la majoj (E Jercke).
 34. Aforismoj el ruŝaj aŭtoroj (Mexin).
 35. La ora fingroringo (Bekér-Persival).
 36. La mateno, La vespero, La nokto (St. Zivanoviĉ).
 37. La finnaj enigmoj (Lappi).
 38. Nova marŝo, Medito en tombaro, Bildo el mia lando, La maro (P. Stojan).
 39. Kiel? — Nokto kaj tago (Obraczov).
 40. Maksimoj kaj pensoj (Maricá-Couto).
 41. La felico (Nomborg-Jurysta).
 42. La almozulo sur la Arno-bordo (Rosenberger-Fischer).
 43. Laktocigno, La porkoj flugantaj (Kivikas).
 44. Spritejo, La domŝlosilo La sovaĝa grafo, La elektra lumo, Stranga sono (Dr. Schweiker).
 45. Moderna alhemio (Kiuza).
 46. La pilgrimado al Keplar' (Heine).
 47. La kartoteko en la literujo, Nokta vizito, Esperanto kaj la policanaro aŭ la malservemaj delegitoj, Pacaj batalantoj (Kristiano Malleria; aperos, se ili ankoraŭ estos aktualaj, kiam la loko permesos ilian publikigon).

2. Eble aperontaj manuskriptoj.
1. Floretino (Jaro Sten).
 2. El „Tableau de Paris“.
 3. Riski kaj poste persitii (aperonta, se la sendintino konfirmos al ni la konsenton de l' aŭtoro).
 4. Vidaĵkartoj (aperos eble ekster la felietono.)
 5. Al muzo.
 6. Motivoj de Sinajo (bona manuskripto, tamen supozeble ne taŭga por ET).
 7. La amindumado de la sinjoro de Dumbledykes.
 8. La rakonto de vaganta Vilĉjo.
 9. Amikeco inter infanoj (interesa sed disputinda).
 10. Pri la denseco de l' Universo.
 11. Mekskilandaj ruinoj (iom longa por ET).
 12. Por memoro de A. Grabowski.
 13. La triumfo de Zaviŝa la Nigro.
 14. La filmo de respondeco (vidu rimarkigon ĉe 3).
 15. Ivano la blinda.
 16. La malsanulo.
3. Ne aperontaj manuskriptoj.*
44. Spritajoj (I. P.).
 45. La Esperantistino.
 46. Trovato.
 47. La sola floro.
 48. Juro.
 49. Mi estis sentema.
 50. Printempo? Jes.
 51. La junka bastono.
 52. Mia unua laŭmezura pantaloneo.
 53. La kornikoĉaso.
 54. La Lakta Vojo.
 55. Tiro.
 56. Animo Esperantista.
 57. Rajdas sur azen' paŝtist'...
 58. Soldata enigmo.
 59. Vanja kaj Olla.
 60. Ŝi ekkantis.
 61. Sarado (taŭga, sed ne por ET).
 62. Miĥel.
 63. Estu juna kaj estu bela.
 64. Malsana mi estas.
 65. Kio fariĝus el mi.
 66. En viva bruoj.

* Verkintoj de ne aperontaj manuskriptoj, kiuj deziras ilian resendon, bonvolu sciligi nin en la daŭro de du monatoj aldonante la numeron kaj titolon.

71. La frangulo.
72. La turo de l' malsato.
73. Malgrandeta felico.
74. Nokto.
75. La mildigita leono.
76. La kursoj en kolo.
77. Kanto pri l' albatroso.
78. La fragmento el la korespondado.
79. Post karnavalo (taŭga, sed ne por ET).
80. La doganisto forprenita de l' diablo.
81. Somera bildo.
82. Al la fratino foresta kaj malsana.
83. Amo pasinta.
84. Estu benata (jam ekzistas belaj tradukoj de Kabe kaj Grabowski).
85. Doktoro Nekelmo (ET ne povas represii literaturajn aperintajn en aliaj Esp. gazetoj).
86. La du bildoj (enhavo tro simpla por ET).
87. La patro kaj la filo.
88. Kantas jen la najtingalo.
89. En songo mi vidis ĉielon.
90. Esperantida, La papilio, Lulkanto, La revo.
91. Spleno.
92. Arhimajstro.
93. Maljuna sonorigisto.
94. Bona rimedo por la dikigo.
95. La rozo.
96. La kameleono.
97. Nubajo en Pantalono (tro futurisma).
98. Mia solena dimanĉa parolado.
99. La oro kaj la skribo.
100. Fabelo pri ŝippeantoj.
101. La sekreto.
102. La rabistejo.
103. Plu neniam, Saluto al suno.
104. Stieliso.
105. De l' kantisto malbeno (bona traduko jam aperis en „La Revuo“).
106. Kariero.
107. Vivo kaj verkoj de Theodor Storm.
108. Ĉerco.
109. Neĝulino, Najtingalo. La birdoj en la kaĝo, Virineto kiel ungeto, Triloj, Ĉesu kukoletoj, Aŭtuno, El Nikolao Klujev.
110. Trioleto.
111. Vespero en Lakedemonio.
112. Pjero.
113. En vojaĝo.

114. Ekvagante, Ĝusta edzigo, La najtingalo kantis.
115. La vilaĝo najtingalo.
116. La sorĉisto de Menio-parko.
117. La influo de la belartoj sur la bulgaran nacian evoluon.
118. La donaco de Ferdinandino.
119. Miĥikamarado N. N.
120. La eduka valoro de la Esp. literaturo.
121. La neekkonita horo (tro politika por ET).
122. Ĉaso.
123. Profesoro.
124. La bildo de l' pitrino.
125. La sekreto de l' amo.
126. Poezio.
127. Charles Müller.
128. Kun aŭ kontraŭ la rajto — mia lando!
129. Ĉinĉinoto.
130. Ĉe la maro.
131. Malantaŭ monaĥeja muroj.
132. Aŭtudo.
133. Porflugantaj nuboj.
134. Regulo pri nombro 10.
135. Somera pluvo.
136. En la ruĝan senlumon, Izabelo en Pigmelando, Vizito de vereco, Ĉu estas kredinde, ke la kulpiĝo kontraŭ Hamleto estas justa?
137. Triobla mortigo al monaĥinoj malkovrita de servistino.
138. Striko.
139. La granda salto (tradukon de traduko ET ne bone povas publikigi).
140. Prego.
141. La ora ĉeno aŭ La surprizo.
142. La smeralda pinglo (vidu rimarkigon ĉe 139).
143. La malgranda Häwelmann.

El Malvivaj Animoj

de Gogol.
(Ĉapitro VII.)

Felica estas vojaĝanto, kiu post longa, enulga vojaĝo kun ĝia malvarma, malseka vetero, koto, nefindormintaj staciestroj, tintado de sonoriletoj, riparoj, interinsultoj, veturigistoj, forĝistoj kaj kun aliaj ĉiuspecaj vojaĝaj malagrabluloj — vidas fine

la nomo de la Internacia Komitato ĉiujn redaktorojn de tiuj gazetoj, kaj tute aparte la redaktorojn de „Eperanto Triumfonta“ por la speciala numero de ET, kiun li aperigis la 21-an de majo, kaj la redaktorojn de „Eperanto“ kaj la estrojn de UEA por la artikoloj en tiu ĵurnalo kaj por senpaga plena paĝo en la ĵarlibro por nia alvoko. Dum la nuna monato ni elsendis multajn cirkulerajn leterojn adresitajn al ĉiuj konataj naciaj societoj kaj individuaj helpemaj samideanoj tra la mondo, en kiu letero ni petis ilian helpon por sukcesigi la monokolekton. Tio laŭ la opinio de la Organiza Komitato sufiĉas nuntempe, ĉar estas necese konservi la fortojn kaj ne fari necesajn elspezojn. Ĝisnunaj elspezoj konsistas nur el la kosto de la eldono de la kupon-kartoj, la premioj por la Varsovia konkurso £20 kaj poŝtaj elspezoj de la sekretario kaj kaskisto.

Oficeja statistiko: Leteroj ricevitaj 89, leteroj forsenditaj 122, cirkulerol forsenditaj 580.

La Organiza Komitato, kiu akceptis por si la taskon, estas preta labori per sia tuta forto kaj energio por sukcesigi la projekton, kaj la konscio, ke ĝi ricevos la subtenon de la tutmonda Esperantistaro, donas al ĝi la kuragon iri antaŭen kun la projekto kaj sukcesigi ĝin por la honoro de la granda genulo, la kreinto de Esperanto.

Raporto de la Hon. Kaskisto al la Kongreso en Helsinko.

Brita mono ricevita	£ 72.7.3	
Pagita al D-ro Róbin por premioj	20.00.0	
Diversaj elspezoj	17.0	
Deponita en Chydesdale Bank	47.13.0	
Mono en kaso	3.16.9	
	£ 72. 7.3	72.7.3
Ĉeĥoslovaka mono kolektita dum Kongreso en Praha		kč. 4543.68
Prahaj elspezoj	450.88	
Deponita en Banko de Bohemio	4093.00	
Mono en kaso	0.10	
	kč. 4543.68	4543.68
Polaj markoj deponitaj en Banko de Komerco, Łódź	95 314.30	95 314.30

Allaj sumoj ricevita:		
Belgaj frankoj	500.—	
Finnaj markoj	60.—	
Svedaj kronoj	5.—	
Holandaj guldenoj	1.—	
Italaj liroj	50.—	
Sumoj promesita:		
£	28.19.0	
Hfl.	10	
Kč.	20	
§	510	

Babelo en Leipzig.

Striko. — Helsinko. — Rememoro pri Praha. — Al Leipzig. — La lingva Babelo. — La valuta barometro. — Unu haveno: La foira renkontejo por Esperantistoj.

La abomena striko de marinĝeneroj malebligis al mi ĉeesti la Internacian kunvenon en Helsinko okaze de la Universala Kongreso de Esperanto. La belaj tagoj de Praha dum la pasintjara kongreso ankoraŭ staras reliefe en mia memoro. Tiam mi ĝuis la ekstazon de la abelo, kiu en granda ĝardeno de diversspeca floraro ĉirkaŭflugas de unu floro al alia kaj per la sama kiso eluĉas diversspecajn dolĉaĵojn. Ankaŭ mi ĉirkaŭflugis tie inter amaso da diversspeca homaro, kaj per unu sama lingvo, per Esperanto, mi elĉerpis diversspecajn sentojn, diversnaciajn aspirojn kaj diversajn de informaro, kiu liveris utilaĵojn.

konatan tegmenton kun rapidantaj renkonte fajretoj, kaj aperos antaŭ li konataj ĉambroj, ĝoja krio de elkurintaj renkonte homoj, bruo kaj kurado de infanoj, kaj trankviligaj kvietaj paroloj, interrompataj per pasiaj kisejoj, kiuj povas ekstermi ĉion malgajan el la rememoro. Felĉa estas familiano, havanta similan angulon, sed ho ve al fraŭlo!

Felĉa estas verkisto, kiu irante preter karakteroj tedaj, abomenaj, frapantaj per sia malgaja realo, alproksimiĝas al karakteroj, montrantaj altan indecon de l' homo; kiu el la granda amaso de ĉiutag-cirkulantaĵoj elektis nur malmultajn esceptojn, kiu neniam ŝanĝis la altsentan agordon de sia lito kaj neniam malsupreniĝis de sia supra al mizeraj kaj malfelĉaj gefratoj, kaj ne tuŝante la teron tute sin donis al siaj malproksimigitaj kaj grandigitaj figuroj. Duoble estas envidinda lia felĉa sorto: li estas inter siaj figuroj kvazaŭ en sia familio; kaj dume lia gloro disvastiĝas malproksimen kaj laŭte. Li vualis per ĝulgua fumo la okulojn de l' homoj; li estas mirinde flatinte al ili, ĉar li kaŝis la tutan vivmalgajaĵon kaj montris al ili belegan homon. Ĉio aplaŭdante rapidas post li kaj kuras post lia triumfa durada veturilo. Oni nomas lin granda tutmonda poeto, alte ŝvebanta super ĉiuj aliaj mondgenuloj, kiel ŝvebas la aglo super ĉiuj alieflugantoj. Lia nomo sola tremigas junajn kaj flamaĵn korojn... Neniu egalas al li en la forto — kaj li estas nun Dio! Sed ne simila estas la antaŭdestino kaj alia estas la sorto de verkisto, kiu arogis videbligi la estantecon ĉiumomente per la okuloj, ne viditan de niaj indiferecaj okuloj — kiu videbligis la tutan teruran, frapantan ŝlimon de malgravaĵoj ĉirkaŭvolantaj nian vivadon, la tutan profundon de malvarmaj, dispecigitaj kaj trivialaj homokarakteroj, kiuj svarmas sur nia surtera, iafoje malgaja kaj enulga vojejo;

Al tio mi sopiris, sed ne povis atingi pro la striko. Sed eble venos konsolo, mi pensis, mi ja iras al la Leipzig'a Foiro, ankaŭ internacia kunveno en plena senco de la vorto, kaj mi iris esperplena.

Sed ho, kia diferenco, kiaj haosoj kompare kun nia internacia kunveno de Esperanto! Superflue mi ankaŭ vidas ĉi tie nur unu homaron, sed je ĉiu paŝo mi eksentas la diversnaciecon.

Jen mi alpaŝas al budo, demandas informon pri artiklo. „Mi bedaŭras,“ diras ĝentile la vendisto, „mi ne parolas angle; eble la sinjoro parolas france, tiun lingvon mi scipovas iomete?“ Lia najbaro ankaŭ bedaŭras ne povi paroli angle, sed scipovas bonege la hispanan lingvon. Alia vendisto fanfaronas, ke li bonege parolas germane kaj tio sufiĉas por lia nuntempa vivo.

La ĉiuhora ŝanĝo de la monkurzo plikonfuzigas la kuitiman konkordon kaj uniformecon de la foiro. Unu fabrikanto citas la prezojn en holandaj guldenoj, lia dekstra najbaro deklamas en dolaroj, dum lia maldekstra konkuranto ĉiam nur havas pundojn anglajn sur la lipoj, „Lloyd Gorgoj“ li nomas ilin, kaj la kompatinda unulingva allandulo devas barakti ne nur kontraŭ la lingva Babelo sed ankaŭ kontraŭ la freneza valuta barometro. Li devas ekzemple diri al si: unu guldeno faras ĉirkaŭ du ŝilingojn, tio signifas nuntempe sepcent germanajn markojn, kaj por kompari la prezojn tio devas esti rekalkulita al ĉirkaŭ 50 usonaj centoj; subite divenas la nova monkurzo, kaj ĉia preciza kalkulo estas detruita.

Ho, la belaj sonoj de tiu Esperanto-kongreso kaj libera interŝanĝo de informoj ne estus efektive igita en Leipzig; sed dank' al la folioficeja saĝeco ekzistas almenaŭ unu haveno en Leipzig, kie ĉiuj lingvaj bariloj kaj haosoj de miskompreno estas forigitaj. Mi enfalas en la renkontejon por Esperantistoj. Kia paradizo! Mi vizitas ĝin kelkfoje dum la tago por trovi trankvilon kaj ripozon, kaj enspiras denove unuforman interparolon. Almenaŭ dekkvar diversnaciajn mi renkontis tie. Franca samideano babilas al ukraino, ĉeĥa fraŭlino intermiksas ridetoplenan rimarkon, kaj bulgaro „flankas“ kun la lasta, kaj la germana ĉeestanto tute ne bezonas konfesi pri sia nesacio de alies lingvo. Konkordo, uniformeco kaj perfekta interkompreno regas. Kia beno por la allandulo, kiu devas barakti ekstere kontraŭ ĉiuj lingvaj haosoj! Kiam, ho, kiam venos la tago de Esperanto por ĉiuj vizitantoj de la Leipzig'a Foiro?

J. D. A. Liverpool.

Pacifista faka kunsido dum la XIV-a en Helsinko.

La kunsidon malfermis Doktoro Felix Iversen en la nomo de Finnlanda Pacifista Ligo. Ĉeestis ĉirkaŭ 60 personoj, el la landoj angla, bulgara, ĉeĥoslovaka, ĉina, dana, franca, finna, estona, germana, nederlanda, itala, litova, pola. Kiel prezidanton oni elektis Doktoron Heinrich Arnholt el Germanlando, kiel vicprez. s-inon Julie Lebrucker el Holando, kaj kiel sek. s-inon Mary Riley el Angiolando. S-o Aarne Selinhelmo el Finnlando prezentis salutojn alvenintajn al la kunsido; sekvis naciaj raportoj pri pacifista movado en diversaj landoj: Internale Danlando, Holando, Angiolando, Germanio kaj Finnlando. Poste s-o Aarne Selinhelmo faris referaton por diskutado pri la taskoj kaj devoj de Esp. pacifistoj. La kunveno aprobas la proponojn de D-ro Bischofsky el Praha: ke Esperantistoj en ĉiuj landoj propagandu: 1. por pacifismo en naciaj Esp. rondoj, 2. por Esperanto en naciaj pacifistaj rondoj, kaj 3. por fondi specialajn sekciojn de Esp. pacifistoj kun la celo poste kunligi ilin por formi Internacian Esperantistan Pacifistan Ligon. Post longa kaj vigla diskutado oni decidis ankaŭ elekti komitaton, kiu priorgu pri la aprobitaj proponoj.

Oni raportis pri la Deklaracio Kontraŭmilita de la Internacia Movado por Forigi Militon, kiu estas aprobita en la faka kunsido de Pacifistoj de la XIII-a en Praha. La deklaracio estas jena: „Kredante, ke ĉia milito estas malprava, kaj ke la armado de la popoloj, ĉu mare, tere, aŭ aere, estas perdo kontraŭ la spirita unueco kaj la inteligento de la homaro, mi deklaras, ke estas mia intenco neniam partopreni en milito, ataka aŭ defenda. Internacia aŭ civila, ĉu portante armilojn, fabrikante municiojn aŭ memvole kotizante al milita prunto, aŭ uzante alian laboron kun la celo liberigi aliajn por milita servo. Plue, mi de-

kaj kiu kuragis ilin elhaki per forta kaj senindulga skulptilo kaj reliefo ilin starigi antaŭ la okuloj de l' popoloj. Li ne kolektos popolaĵn aplaŭdojn, kaj li vidos nek larmojn de danko nek unuaniman admiron de la animoj tuŝitaj de li; al li ne flugas renkonte deksejara junulino kun turniginta kapo kaj la heroa sindono; li ne forgesos sin tute en dolĉa ĉarmo de sonoj eligitaj de li; li ne evitos fine niatempan juĝon, hipokrite-sensentan niatempan juĝon, kiu nomos kreaĵojn de li dorlotajn, malgrandaj kaj abomenaj, kiu donos al li maleslimindan angulon en vico de l' verkistoj, kiuj ofendas la homaron; tiu juĝo aldonos al li la kvalitojn de herooj prezentitaj de li, ĝi forprenos de li la koron kaj la animon kaj la diecan flamon de la talento: ĉar ne konfesas la juĝo niatempa, ke estas egale mirindaj vitroj, kiuj rigardas la sunon, kaj kiuj transdonas movetojn de la insektoj nerimarkitaj; ĉar ne konfesas la juĝo niatempa, ke oni bezonas grandan spiritprofundecon por hele lumigi bildon, ĉerpitan el vivo malnobla, kaj por fari el ĝi verkon altgradan; ĉar ne konfesas la juĝo niatempa, ke rido altaanta lirika indas stari apud alta lirika sentmovo, kaj ke estas granda abismo inter ĝi kaj grimacoj de bud-arlekenoj! Ne konfesos ĉi tion la juĝo niatempa, ĝi riproĉos insulte verkiston nefavoratan: sen kunsento, sen respondo, sen kompato, kiel senfamila vojaĝanto, li restos sola meze de l' vojo. Severa estas lia agadejo, kaj maldolĉe li eksentos sian solecon.

Kaj la mirinda potenco antaŭdestinita al mi longe ankoraŭ iradi brak-en-brake kun miaj strangaj herooj, ĉirkaŭrigardi la tutan grandan kurantan vivon, ĉirkaŭrigardi ĝin kun rido videbla por la mondo kaj kun nevideblaj kaj nekonsentaj larmoj! Kaj malproksima ankoraŭ estas la tempo, kiam la minaca ventego de l' inspiro kun alia forto eliros el la kapo vestita per sankta

klaras mian intencon klopodi por la forigo de ĉiuj kaŭzoj de milito, kaj labori por la fondo de nova socia ordo bazita sur kunlaborado por la komuna bono.“

Ankaŭ oni raportis pri la leĝo, kiu anstataŭigas militservon per civilservo en Danlando, Svedlando, Norveglando, kaj kiu estas farota en Finnlando kaj Holando.

Al la tutmonda Esperantistaro!

Kun granda ĝojo kaj entuziasmo ni sciĝis, ke la kongreso en Helsinko akceptis nian inviton, elektante Nürnbergon kiel kongresurbon por 1923. Kore ni dankas al niaj samideanoj el ĉiuj landoj pro la granda konfido, montrita per tiu decido. Bone ni sentas la gravan respondecon. Ni promesas labori kun streĉitaj fortoj por solvi kontentige la malfacilan taskon kaj certigi al nia XV-a sukcesplenan kaj brillan daŭrigon.

Kompreneble ni solaj ne povos plenumi la grandegan verkon. Ni bezonas la apogon kaj subtenon de ĉiuj. Pro tio, karaj kaj ŝatataj samideanoj, ni direktas al vi la insistan kaj koran peton: Helpu nin! Venu ĉiuj! Varbu novajn anojn kaj kunvenigu ilin, por ke la XV-a estiĝu grandioza kaj impona manifestacio! Aligu kiel eble plej baldaŭ por certigi la budĝeton! Sciigu al ni ĝustatempe ĉiujn viajn dezirojn kaj iniciatojn, por ke ni profitu ilin!

La XV-a havos specialan gravecon en la historio de Esperanto. Ĝi estu revuo kaj bilanco de la ĝisnuna atingito kaj liveru al la mondo la konvinkan pruvon por la realigebleco de nia sublima ideo.

Nürnberg, la lulilo de Esperanto, vidu ankaŭ ĝian triumfon!

La Esperanto-Kartelo Nürnberg-Fürth.

XV-a Universala Kongreso de Esperanto en Nürnberg.

Unua Cirkulero.

1. Starigo de L. K. K. La Loka Kongresa Komitato, elektita de la Esperanto-Kartelo Nürnberg-Fürth, konsistas el jenaj personoj:

S-o D-ro Richard Ledermann, prezidanto (ĝenerala organizo)

S-o Otto Pilhofer, I-a vicprezidanto (propagando)

S-o D-ro Heinrich Orthal, II-a vicprezidanto (gazetaro)

S-o Max Höhnigsberger, sekretario (financoj)

S-o Lorenz Meyer (plezurafloj)

S-o Emil Muscat (loĝigo)

S-o Heinrich Nass (akceptejoj)

S-o Alfred Meyer-Kirstin (oficejo).

2. Adreso. La oficiala leter- kaj telegramadreso de L. K. K. estas: Esperanto Nürnberg. — Ĉiuj korespondantoj koncerntaj kongresajn aferojn, ankaŭ mensejoj, estu adresataj nur al tiu adreso.

3. Aligo. Samideanoj, dezirantaj aliĝi al la XV-a, estas petataj uzi la aliĝilojn eldonotajn de la L. K. K. La aliĝiloj estos dissendataj pere de la tutmonda Esp. gazetararo, dum oktobro-novembro. Samideanoj, kiuj tiel ne ricevos la aliĝilon, petu ĝin de L. K. K.

Ĉar por bona prosperado de la kongresaj preparoj estas tre necese, ke la L. K. K. jam tuj en la komenco havu je sia dispono sufiĉe da mono, la samideanoj-aliĝintoj estas serioze petataj kiel eble plej baldaŭ aliĝi kaj pagi la kotizon.

4. Kotizo. La Kongresa Kotizo, tre malfacile fiksebla en la nunaj valutaj cirkonstancoj, estos

teruro kaj brilo, kaj oni eksentos, konfuzo tremante, la majestatan tondregon de novaj paroloj...

Tradukis el rusa lingvo S. Rublev.

Rimarko de l' tradukinto.

Tiu ĉi fragmento estas elĉerpita el la granda proza poemo de N. V. Gogol „Malvivaj Animoj“. La fama rusa verkisto N. V. Gogol (1809—1852), la rusa Dickens, kiel oni nomas lin, pentris en sia poemo majestatan bildon de liatempa Ruslando. En sia poemo Gogol prezentita ĉiutagan, trivialan vivon de rusa provinco, kaj li kreis el siaj herooj senmortajn tipojn. Tiu ĉi fragmento estas unu el la multaj lirika deflankiĝoj disŝetitaj en diversaj lokoj de la poemo.

Infankanto.

Kie sin klinas salikoj
Apud sunplena river',
Jen flugas kaj dancas libeloj
Per gajga rondmanter'.

Infano, al ni proksimiĝu —
Flirtadi instruos ni vin,
Infano, vi pli rapidiĝu,
Dum dormas severa patrino.

Sub ni, jen, tremetas herbeeto,
Ni fartas bonege, je Di', —
Briletas turkisaj dorsetoj
Kaj vitraj flugiloj ĉe ni.

Ni kantas belsonan lulkanton,
Verkitan nur sole por vi —
Vi lasu patrino dormantan
Kaj venu tra l' akvo al ni.

Kantata en 3-a Infana Domo, Omsk.

Trad. A. Kolĉin, Omsk, Siberio.

publikata interkonsente kun la K. K. K., en la dua cirkulero.

5. Fakaj kunsidoj. Same kiel en antaŭaj kongresoj, okazos ankaŭ en 1923 specialaj fakaj kunsidoj. Pri eventualaj deziroj ni petas kiel eble plej baldaŭ informi la L. K. K.

6. Oficiala organo. Kiel oficialan organon de L. K. K. ni elektis la neŭtralan, sendependan kaj ĉiusemajnan gazeton „Eperanto Triumfonta“, kiu publikos ĉiujn niajn prikongresajn komunikojn kaj transdonos al la cetera Esp. gazetaro. Jen, laŭ nia opinio, la plej rapida kaj plej malkara vojo por diskonigi la kongresajn al la tutmonda Esperantistaro.

Loka Kongresa Komitato:
D-ro Ledermann.

La kvara skolta leĝo.

Kiu amplekse esploris la kaŭzojn de la pasintaj internaciaj, eĉ naciaj, polemikoj kaj diferencoj, tiu sendube venas al la konkludo, ke en plej multaj okazoj la ĉefa kaŭzo estis ĉiam la manko de toleremo, kunligita kun la malkompreno de la vidpunkto de la alia flanko: aŭ, en unu vorto, la manko de la spirito de frateco.

Speciale al la Esperantistaro tiu kaŭzo estas tute komprenebla, tial tio, kion mi skribas, devas interesi ilin.

La fondinto de la skolta movado, lia kavallira moŝto Baden-Powell, klare komprenis, ke, se la popoloj de la mondo iam vivos en „sankta harmonio“, oni devas eduki la nunajn generaciojn en la spirito de frateco. Plene kompreninte la signifon de tiu fakto, li saĝe bazis la skoltan ideon sur la spirito de frateco, kaj la brita kvara leĝo diras, ke „Skolto estas frato de ĉiu alia skolto, ne gravas, al kiu socia grado la alia apartenas“.

En la edukado de knaboskolto tiu kvara leĝo ludas tre gravan rolon kaj preskaŭ ĉiuj skoltaj praktikoj celas admoninstrui tiun spiriton de frateco.

Por skolto estas devo esti frato al ĉiu alia knabo, sed, kiam li renkontas skoltojn el alia fremda lando, tuj evidentigas la lingvo-malfacilaĵoj kaj eniras en sian kapon la penso: „Kiel mi povas esti frato al mia fremda fratskolto, se mi ne scias paroli lian lingvon?“ Se tiu renkontita skolto estas franco, eble la brita skolto (ekzemple) scias paroli la francan lingvon, sed kiam li renkontas skoltojn el Hispanujo, Rusujo, ktp., li nur povas paroli kun tiuj kaj kompreni ilin, kiuj parolas la anglan aŭ francan lingvon. Kaj tiam en sia simpla maniero li ekkomprenas la neceson de komuna helplingvo.

Jen, miaj geamikoj, gesamideanoj, estas fruktopromesa grundo, kiu devus esti kulturata de vi.

Starigis antaŭ tri jaroj en Londono la Skolta Esperantista Ligo, kies Propaganda Fakestro la verkinto de ĉi tiu artikolo estas. En tre multaj landoj ni elektis naciajn agentojn, kaj ĉia ĉefa celo estas la disvastigado de Esperanto inter la geknaboskoltaro de la mondo. Mi estas preta kunlabori kun ĉiuj, kiuj povas helpi al ni. Ni bezonas spertajn Esperantistojn en ĉiuj partoj de la mondo, kiuj estas pretaj starigi klasojn por geskoltaj. La estroj de trupoj ne serĉos por instruantoj ĝuste pro tio, ke ili jam havas sufiĉan laboron por fari en aliaj direktoj; tamen mi estas certa, ke ili volonte permesus eksterulojn instrui ilajn trupojn pri Esperanto. Se mia sugestoj ĉi supra allogas vin, bonvole skribu al mi por pludiskuti ĝin kaj aranĝi detalojn. Mi povos konatigi al vi niajn naciajn agentojn, kiuj helpas al vi laŭeble. Mi plezure donos pluajn detalojn pri nia Ligo al ĉiuj, kiuj volas reciproke helpi al ni kaj al la Esperanto-movado. Jen mia adreso: 527, Lea Bridge Road, Leyton, London E. 10., Anglujo.

J. W. Leslie,
Propaganda Fakestro de S. E. L.

Serĉu belecon!

De E. Gerken.

Belecon serĉu vi en la ĉiel' lazura,
Belecon serĉu vi en bril' de radiar',
En diafana font', vesper-sonor-murmuro
En la majesta vast' de arba foliar'....

Belecon serĉu vi en roza florbungono —
Donaco de ridanta, hela Maja torĉ',
Belecon serĉu vi en noktmistera sonĝo,
Sendanta min en land' de ama sort'....

Belecon serĉu vi en ĉiu vivaĵo
Kaj ne priplendu tro pri reva la trompec'....
Se guton da felĉ' al vi, nu, ĵetit sorto, —
Responde, kvankam guton, donu la belec'....

El rusa lingvo tradukis
Vadinj Obrazcov, Kazan.

Humoro.

La nigraj kokinoj.

Knabo entrinte butikon: „Mi deziras 6 ovojn — sed nur de nigraj kokinoj.“

Vendistino: „Ĉu ovojn de nigraj kokinoj? Mi ne povas diferencigi, kiuj ovoj devenas de nigraj kaj kiuj de aliaj kokinoj. Ĉu vi?“

Knabo: „Certe.“

Vendistino: „Do volu elserĉi ilin.“

Kaj la knabo elserĉis kaj prenis.... la plej grandajn.

Vendistino: „Ha vi friponeto, pro via ruzeco ĉi tiun fojon mi konsentas, sed ne plu venu denove aĉeti ovojn de nigraj kokinoj, alie....“

La IV-a Hungara Landa Kongreso en Miskolc.

Ok jaroj forpasis de post la lasta landa kongreso en Hungarlando, kiam en 1914 en Szeged kelkaj cent samideanoj kunvenis. Dum la milito dormis la movado kaj ankaŭ post la milito la tempoj ne estis taŭgaj, la movado ne estis sufiĉe forta, por aranĝi landan kongreson. Okazis jarkunvenoj, Esperantaj tagoj, eĉ lastjare bonsukcesa postkongresa festo en Budapeŝto, sed la malgranda lando ne havis landan kongreson. Ĝis fine ĉiujare la kuraĝa juna miskolca grupo sub la gvido de prof. König, fratoj Györy-Nagy kaj kelkaj aliaj invititis la IV-an Hungaran Landan Kongreson en sian belan urbeton.

La kongreso okazis la 26. kaj 27. aŭgusto kaj kunvenigis proksimume 180 samideanojn el 18 grupoj el diversaj partoj de nuna Hungarlando. Rezentantanoj sendis ankaŭ la Turana kaj Turul Asocioj kaj la budapeŝta policista grupo. Germanajn samideanojn reprezentis s-ano Petermann, la Rumanan Esp. Societon s-ano Moraviu el Cluj (Kolozsvár).

La 26-an antaŭtagmeze estis en la urbdomo la malferma kunveno. Prezidanto de la kongreso fariĝis la agema miskolca profesoro Ludoviko König. En la nomo de la urbo ĉefnotario Halmay salutis la kongreson. Post salutparolado de la grupoj s-ano Kalocsay transdonis la salutojn de finnaj kaj vienaj samideanoj, kaj post raporto de s-ano Balkányi pri la XIV-a en Helsinko, s-ano Kalocsay deklamis la Kongresan Runon kun grandega sukceso. Post la solena kunsido la ĉeestantoj sub la standardo iris al la katolika gimnazio, kie estis la ekspozicio bonege organizita. Tie s-ano Balkányi devis denove hungarlingve raportiti pri la kongreso en Finnlando kaj esprimis la ĝeneralan deziron, ke post kelkaj jaroj en Budapeŝto povu okazi la mondkongreso.

Post komuna tagmanĝo okazis en la urbdomo UEA-jarkunveno kaj la Landa Konferenco pri Esp. Instruado laŭ modelo de la ĝeneva internacia konferenco. La ĉeestantaj hungaraj profesoroj aŭskultis atente la detalan raporton de prof. König pri rezultato de la ĝeneva konferenco kaj s-ano Balkányi anoncis, ke la ministro por religiaj kaj instruaj aferoj letere komisiis lin, fari raporton pri la konferenco. Pastro Kozma kun elokventaj vortoj klarigis la neceson de Esp. instruado por Hungarlando kaj reallerneja direktoro Nessel raportis pri spertoj de uzo de Esperanto en la Turana societo. Laŭ propono oni akceptis rezolucion, en kiu oni alvokas la atenton de ĉiuj hungaraj instruistoj kaj profesoroj al la manifesto de la ĝeneva konferenco, kaj la ministron por instruaj aferoj oni petas, ke li ordonu la nedevigan instruadon de Esperanto en mezlernejoj ĉiuspecaj.

Vespere en amuzejo de popolĝardeno okazis **bonsukcesa, parte Esperantlingva koncerto**, ĉe kiu s-ano Kalocsay deklamis novan festpoemon verkitan por la hungara kongreso. Grandan sukceson akiris s-anoj Kéthelyi, Forgon kaj s-ano Baghy. — La danco daŭris ĝis la dua horo.

La duan tagon estis la laborkunsido, ĉe kiu D-ro Takács prezentis unuoran raporton pri la Esp. movado en Hungarlando dum la lastaj ok jaroj. Laŭ diversaj proponoj de s-ano Baghy, Takács kaj Major oni akceptis la starigon de **Hungara Esperanto Instituto**, kiu kunigu la statistikon, la ekzamenon, la propagandon, la festaranĝadon kaj la informadon. Aparta komisiono elektita devas elabori la planon. Oni decidis eldoni apartan libron kun poemoj de fama poeto Petöfi, kies centjara naskiĝtago nun solene festas la hungarojn. Kalocsay havas jam pretaj 100 poemojn kaj tutan popol-fabel-poemon „Johano, la brava“. — Post malgrandaj proponoj akceptitaj prof. König fermis la kongreson. Antaŭ la fermo s-ano Patali, prezidanto de la budapeŝta grupo, per bela parolado dankis la organizantojn kaj alvokis al efika laborado tutlanda. — Por fini oni kantis la hungaran kaj Esperantan himnojn.

Posttagmeze la kongresanoj ekskursis al bela montarregiono apud Miskolc kaj kantante revenis per specialaj vagonoj. Vespere jam forlasis la gastoj la urbon, sed kunportis ne nur bonan humoron kaj belajn impresojn pro la agrabla kunesto kaj pro la neatendite bona sukceso, sed ankaŭ la esperon, ke la proksimjara kongreso okazonta verŝajne en suda urbo Pécs povos saluti jam pli grandan movadon.

Pri la kongreso en Helsinko kaj Budapeŝto mallongaj sciligoj aperis en preskaŭ ĉiuj ĵurnaloj. Pri la miskolca kongreso la gazeto Pester-Lloyd raportis mallonge dum kvin sinsekvaj tagoj.

Komerco.

Fervoja rabato por vizitantoj al Frankfurta Foiro.

La svisa kaj itala ŝtataj fervojoj konsentis rabaton por vizitantoj al la venonta Foiro de Frankfurt, okazonta la 8.—14. okt. Legitimacio estas havebla ĉe la itala reprezentanto de la Foiro, Dr. Otto Stünzner en Milano, Corso Vitt. Em. 22.

Redakcia Leterkesto.

Fotografajojn pri iu ajn okazo, kies publikigon en ET oni deziras, oni alsendu tuj post pretiĝo; alie ili malnoviĝas. Tiel fotojn pri la postkongreso en Kopenhago kaj Riga ni ricevis nur kelkajn semajnojn post la okazo. (Tiaj de Riga estis sufiĉe frue farsenditaj, sed tro malfrue ricevitaj.) Se oni konsideras, ke ankaŭ la klišofabriko bezonas 4—6 tagojn por klišoj, tiam, kaj ke ET jam estas finkompostata merkrede, oni komprenos, ke tuj alsendo estas nepre necesa. Malaktualigitaj klišoj estas alvenalaj por ET. — La nepublikigeblajn fotojn ni konservas en nia albumo, se oni ne repostulos ilin.

Esperanto ĉe la Ligo de Nacioj.

La Ligo de Nacioj, kiu jam kelkfoje antaŭe ricevis petojn pri akcepto de internacia lingvo, en sia dua kunsido komisiis la ĝeneral-sekretarion fari enketon pri Esperanto kaj prezenti detalan raporton al la tria kunsido, kiu ĵus komencis. Por plifaciligi al la sekretario ĉi tiun laboron, oni aranĝis paskon 1922 la gravan konferencon en Ĝenève, en kiu laŭ antaŭe dissenditaj demando-folioj estas kalkulita la materialo por la raporto. Ĉi tiu raporto nun estas preta. Detale ĝi pritraktas la ĝisnunan staton de Esperanto ĉe la Ligo de Nacioj, la historion kaj gravecon de Esperanto, ankaŭ ne preteriras aliajn sistemojn kiel Occidental, Esperantida, Ido ktp., nomas la landojn, en kiuj Esperanto estas pli aŭ malpli oficiale enkondukita, kaj ankaŭ en aparta ĉapitro montras, kiel Esperanto povas esti uzata kaj jam estas uzata en la praktika vivo.

Aldonita resumo diras:

1. ke ĉe vige sentiĝas bezono je helplingvo por plifaciligi interrilatojn internaciajn;
2. ke sciencaj aŭ komercaj asocioj, studinte la demandon, preferas neŭtralan simplan lingvon kaj ĝenerale rekomendas Esperanton;
3. ke Esperanto ŝajnas esti la plej perfekta;
4. ke Esperanto, uzata de 35 jaroj, akceptis karakteron de vivanta lingvo kaj ankoraŭ povas pliriĉiĝi kaj evolui;

II-a Internacia Konferenco de Foiroj.

La foiroficejo de Helsinko en printempo invititis ĉiujn Eŭropajn foirojn, okazigi II-an Internacian Foirokonferencon dum la XIV-a Universala Kongreso de Esperanto. Rezentantoj de 15 foiroj el 12 ŝtatoj sekvis la inviton. Por komuna kunlaboro voĉdonis Basel, Barcelona, Frankfurt a. M., Helsinko, Königsberg, Leipzig, Lyon, Malmö, Padova, Praha, Reichenberg kaj Zagreb. Unua kunsido estis la 10. aŭg. en la eksa parlamentejo. Nomo de l' ĉefdirektoro de la finnaj foiroj, kiu troviĝis eksterlande, la sekretario legis la salutparoladon.

Post detala raporto de l' reprezentanto de la foiro de Reichenberg oni akceptis la sekvantajn proponojn:

1. Oni konsilas al tiuj foiroj, kiuj ne jam fiksis la datojn de okazigo, eviti aranĝon samtempan kun la aliaj.
2. La foiroj, kiuj havas similajn interesojn, havu reciprokajn informojn.
3. Principe la foiroj estas pretaj transdoni pet-skribojn de fremdaj foiroj al la oficialaj lokoj de siaj ŝtatoj, sed rezervas al si rajton de rifuzo, se la cirkonstancoj postulas tion.
4. La foiroj konsentas senpage publikigi en la propraj gazetoj plej gravajn sciligojn, ekzemple, pri datoj, favoraj kondiĉoj por vizitantoj kaj ekspoziciantoj.
5. La foiroj interkonsentis peti de la mondpostunuigo internacian malaltigon de l' afranka tarifoj por presaj kaj leteroj de la foiroj.

Propono, ke tiuj foiroj, kiuj ĝis nun ne jam faris tion, aldonu al la katalogoj Esperanto-tradukon de la komercaj listoj, estis varme rekomendata pro simpligo de internacia komerca korespondado.

Dum la dua kunsido oni decidis ĝis definitiva solvo de la demando en venonta jaro interkonsenti pri komuna laboro en ĉiuj koncernaj aferoj. Tria konferenco okazis 1923 en Nürnberg dum la XV-a Int. Kongreso de Esperanto. Ĝis tiam komisiono el la reprezentantoj de Frankfurt, Malmö, Reichenberg kaj Padova kolektu kaj prilaboru alvenontajn proponojn.

La konferenco montris la firman volon per organizita kunlaboro doni helpon same al vendistoj kiel al aĉetantoj. Festeno, kiun la direkcio de la finnaj foiroj donis je honoro de la eksterlandaj gastoj, finis la konferencon.

N. B. Niaj legantoj bonvolu traduki la artikolon en nacian lingvojn kaj publikigi ĝin en naciaj gazetoj. Gazetojn kun la artikolo oni sendu al grandaj komercistoj kaj industriistoj, kiuj interesiĝas pri foiroj.

Komisiono starigita de la franca nacia komitato de la Internacia Komercio Ĉambro ĵus adoptis la ĉi-subajn difinojn pri kelkaj komercaj terminoj:

F. O. B.

F. O. B. je la aliro (Free On Board), ĉe la vendo, kiun koncernas tiu ĉi termino, signifas, ke la transmeto de la posedajo kaj de rezultantaj riskoj fariĝas tuj, kiam la vendisto liveris la komercaĵojn sur la ŝipon elektitan de la aĉetanto kaj la ŝipo garantiis tiun ĉi komercaĵojn; — ĉiuj elspezoj de translokigo antaŭ la aliro, entenante la

5. ke Esperanto jam tre multe estas oficiale enkondukita;

6. ke Esperanto estas pli facile lernebla ol iu ajn alia lingvo, ankaŭ por infanoj el orientaj landoj;

7. ke Esperanto ne troŝarĝas la programon de lernejoj, kontraŭe plifaciligas la lernadon de aliaj lingvoj;

8. ke lernejoj fakuloj deziras oficialan internacian aprobon de Esperanto, por havi garantion pri normala evoluo de la lingvo per kontrolo de la Akademio;

9. ke kelkaj ŝtatoj prokrastas oficialan enkondukon de Esperanto nur, ĉar ili atendas kuniron de sufiĉe multaj aliaj ŝtatoj;

10. ke diversaj ŝtatoj jam oficiale akceptis Esperanton por uzado ĉe telegrafio;

11. ke uzado de Esperanto ŝajnas disvastigi spriton de internacia solidareco, konforme al la celoj de la Ligo de Nacioj.

El ĉiuj ĉi kaŭzoj Esperanto estu rekomendata al la atento de la Ligo de Nacioj.

Ni Esperantistoj do vidas, ke nia afero trovis sufiĉan atenton, kaj ni prave povas esperi loman sukceson por ni. Tamen ni ne ĉesigu nian vigan laboron por Esperanto, ĉar en lasta linio ni mem devas esti kaj resti la pioniroj de nia afero.

elspezojn de surŝipigo kaj aranĝo, eĉ kiam tiuj ĉi estis enkalkulitaj en la martransporta kosto, estas pagotaj de la vendisto kaj enkalkulotaj en lia vendoprezto.

Se la afero estas pri rilatoj kun landoj aliaj ol Unuigitaj Ŝtatoj Amerika, la esprimo F. O. B. estas sufiĉa, kaj oni havas profiton ne almetante la vorton „vessel“ (ŝipo), kontraŭe, en la rilatoj kun Unuigitaj Ŝtatoj Amerika, la almeto de la vorto „vessel“ estas nepre necesa.

C. I. F. aŭ C. A. F.

C. I. F. aŭ C. A. F. (Cost, Insurance and Freight) signifas koston, asekuron, martransportan koston. La transmeto de la posedajo kaj de rezultantaj riskoj fariĝas tuj, kiam la martransportistoj garantiis la komercaĵojn; sed la kosto de martransporto kaj asekuro

estas enkalkulitaj en la vendoprezto. Tamen, malgraŭ ke li pritraktas la ŝipluon, zorgas la asekuron kaj prenas sur sin la pagon de tiuj ĉi kostoj (martransporto kaj asekuro) laŭ kontrakta devo rezultanta de la vendokondiĉoj mem, la vendisto, agente pri tio nur kiel komisiisto de l' aĉetanto, aliras sur sin nenian pririspordon koncerne la riskojn de la martransporto, krom se persona kulpo povus esti riproĉata al li.

F. A. S.

F. A. S. (Free Along Side) signifas ke, en la vendo, kiun koncernas tiu ĉi termino, la transmeto de la posedajo kaj de rezultantaj riskoj fariĝas tuj, kiam la vendisto liveris la komercaĵojn laŭlonge de la ŝipo elektita de l' aĉetanto kaj la ŝipo garantiis tiun ĉi komercaĵojn; kosto de translokigo antaŭ la ekmeto sub rublokaparaton (france „palan“) devas esti pagotaj de la vendisto.

C. & F.

C. & F. (Kosto kaj martransporta kosto) signifas tion saman kiel C. A. F. aŭ C. I. F., tamen la prezo de la asekuro kaj la zorgo pri tiu ĉi ne estas enkalkulitaj en la vendoprezto.

F. O. R. & F. O. T.

F. O. R. kaj F. O. T. signifas, ke la komercaĵo estis ŝarĝita sur vagonon. La franca korespondanta esprimo estas „sur wagon“.

Mallongaj Esp. Sciligoj.

Brita Ligo de Esp. socialistoj

deziras ricevi raportojn pri Esperanta kaj laborista movadoj, vivkondiĉoj ktp. por presigi en grava laborista tagĵurnalo de London. Adreso al Cameron, 69 Schubert Road, Putney, London S. W. 15.

Liona Esp. Laborista Grupo. Esperantistaj promenadoj.

Por pliperfektigi en la praktikado de nia lingvo, nia grupo decidis aranĝi promenadojn, dum kiuj ni parolos nur Esperante. Ili okazos ĉiun dimanĉon de 9^h ĝis la 11^h matene. Ni intencas viziti la ĉefajn kuriozaĵojn de Lyon (parko, muzeoj, antikvaj kvartaloj, ktp.)

Kunveno de la grupo, ĉiulunde je 20 h. Strato Paul Bert n-o 6.

Speciala numero pri Nürnberg.

Ni petas atenti en la hodiaŭa ET la loman ŝanĝitajn kondiĉojn por ar. oncoj en la speciala numero.

Grava ekspeda firmo

„Reise- und Transportgesellschaft“ en St. Gallen, Svislando, Leonhardstr. 20, promesis ekspoziti en siaj fenestroj Esp. komercajn broŝurojn. Atentu la anoncon de la firmo en nia hodiaŭa numero.

Okazontaj propagandaj kunvenoj en Germanujo.

IV-a Marka Esp. Tago okazos la 16.—17. sept. en Friedrichshagen apud Berlin. — Berlina Lab. Grupo aranĝos „Verdan Semajnon“ propagandacele de 18.—23. sept. kaj eldonis varbfolion. — En Zittau okazos Tri Esp. Tagoj la 6.—8. okt. Vidu ET n-o 99, pĝ. 4 kaj aliĝu tuj!

Por malsatantaj rusaj gesamideanoj

ni ricevis ankoraŭ (vidu antaŭan kvitancon en n-o 95): de F. Ulrich kaj B. Brüder en Bûrgstein, Ĉsl. 100 gmk.; Emma L. Osmond, London, 2 1/2 ŝil.; f-ino Adelalde Antonelli, s-o Jozefo Antonelli, s-ino Johanno Tenderini, s-o F. C., ĉiuj en Potenza, po 5 liroj, entute 20 liroj.

En Trautenau (Bohemlando)

okazis la 7. sept. la fonda kunsido de la Germana Esp. Junularo Trautenau.

Gazetaro.

Postilortvi, organo de postistoj, Helsinko, n-o 7—8. Kun raportoj pri la XIV-a kaj du aliaj artikoloj pri Esp. Ĵurnallist, 28. 8. (Art. pri la kontraŭesperanta cirkulero de la franca ministro de publika instruado.) Zittauer Nachrichten und Anzeiger, Zittau (Germ.), 6. 9., kaj Zittauer Morgen-Zeitung, 6. 9. Ambaŭ ĵurnaloj enhavas recenzojn pri ET n-o 100, kiun ili elmetis en siaj montraj fenestroj.

Neue Zürcher Zeitung, 3. 9. (Art. Esperanto kaj Ligo de Nacioj.)

Reichenberger Zeitung, 3. 9. (Detala raporto pri la II-a Internacia Foiro Konferenco.)

L'Index des Industries du Cuir, Paris, sept. (Art. pri la Esp. movado.)

L'Action Républicaine de la Corrèze, Tulle, publikigis en sinsekvaj n-oj la repeson de artikolo de prof. Aulard el „Le Progrès Civique“.

L'Informailon Universitaire, Paris, 2. 9. kun ĉefartikolo de prof. Cart kaj repeso de la ĝeneva Manifesto.

La Montagne, Clemon-Ferrand, 2. 9. kun letero de angla s-ano insir. Price pri la pedagogia utileco de Esp.

Journal de Genève, 6. 9. (Pri la XIV-a)

Tribuna, Roma, 2. 9. (Pri la XIV-a.)

Francaj Gazetoj pri la XIV-a.

Krom la jam menciitaj raportis ankoraŭ pri la XIV-a Esp. Kongreso: Le Courrier du Centre en Limoges, L'Action Républicaine en Nemours, Le Petit Haut Marais en Chaumont, Le Télégramme du Nord-Est kaj L'Eclairer en Reims, L'Industriel de Louviers, L'Action Rép. en Tulle, Le Travailleur de l'Eure et Loire en Chartres, L'Argus de Périgord en Périgueux, Le Journal d'Alsace-Lorraine en Strasbourg, Le Petit Méridional en Montpellier, L'Alsace-L'Express de Milhouse, Seine et Marais en Melun, Le Moniteur de Puy-de-Dôme en Clermont-Ferrand, Le Littoral en Cannes, Revell Baugeois en Bauge, Revell d'Angers en Angers kaj L'Intérêt Public en Cholet.

Recenzejo.

LIBROJ.

DUA LEGOLIBRETO. De K. Brüggemann. Universala Biblioteko n-o 2) 64 pĝ. 10 1/2 x 15 1/2 cm. 1922. Esp. Verlag F. Ader, Dresden A 27. — Prezo: 18 gmk. —

Antaŭ kelkaj semajnoj ni preparolis ĉi loken la unuan legolibreton de Brüggemann. Ĉi tiu dua estas kvazaŭ komplemento prezentanta al la uzanto legajojn loman pli malfacilajn ol tiujn, kiujn la nuna volumeto enhavis. Reaŭme ni diru, ke ambaŭ rivalas koncerne bonecon kaj taŭgecon. Nia verkaro ĝenerale la abundas je legolibroj, tamen ĉi tiuj rajtas esti nomataj rekomendindaj precipe pro ilia malalta prezo. Malvultululoj sendube ĝojos pri libreto malmultekosta, kiu kontentigos kaj instruos. (O. Ajut.)

AFIŜOJ, PROPAGANDILOJ, ktp.

De Jongste Suksessen van het Esperanto. (La plej nova sukceso de Esperanto.) 16 pĝ. kaj kovrilo.

Bona propaganda broŝuro en nederlanda lingvo, akribita laŭ simpligita ortografio. La broŝuro estas samtempe bona propagandilo por ET, ĉar ĉiuj faktoj estas prenitaj el ET kun indiko de la koncerna numero. Al la verkinto nian koran dankon! La broŝuro estas tre rekomendinda kaj havebla por 10 centoj ĉe Nederlandse Federatie van Aibeders Esperantisten en Amsterdam, 1-e Sweelinckstr. 19-2a.

GAZETOJ.

La Nova Epoko. N-o 2. Aŭgusto. Holanda Esperantisto, 31. 8. kaj 7. 9. La France Postale Espérantiste, Julio. Belga Esperantisto. Junio-julio.



FIM
INTER-
NACIAJ FOIROJ
FRANKFURT A. M.

Aŭtuna foiro de 8-a ĝis 14-a oktobro 1922.

Ampleksa specimena ekspozicio.
30 branĉoj sur unu tereno. Masivaj foirdomoj. Uzu niajn presajojn kiel reklamon por ni kaj samtempe por Esperanto! — Petu regulan alsendon de informoj de

Messami (Esperanto-fako), Frankfurt a. M.

Esperanto Service Corporation

„Esko“

500 Fifth Avenue New York City
Telegrafa adreso: Esperanto New-York.

Aĉeto, eksporto, importo kaj maklerado
de ĉiuspecaj komercaĵoj.

Katalogoj, prezaroj kaj specimenoj estas danke
ricevataj.

Foiroj, komercaj firmoj

kip. eldonantaj Esperantajn prospektojn, flugfoliojn,
katalogojn, bonvolu sendi al la jena adreso,
se iel eble, po 5 ekzempleroj de tiuj eldonaĵoj:
„Schweiz-Italien“, Reise- und Transport-
Gesellschaft, St. Gallen, Sviz., Leonhardstr. 20.

La malagrablaj flankoj de la Esperanto-instruado

de prof. Otto Simon, Lingva Komitatano.
Gravaj proponoj! Oni sendu
per letero: 0.60 sv. fl., aŭ samvalorajn
poŝtmarkojn de alia lando, al:

Eldonejo Nova Tempo, Vieno, Aŭstrio, Mollardg. 55

Senpage

vi ricevos ie simpla mendo poŝtkarte
de Staedisches Verkehrs-
Bureau helan ilustritan gvidfolion de

Wiesbaden

— internacia banurbo —

Mendu tuj! Ne prokrastu la mendon,
kaj helpu per tio al nia varbado
de la urbal oficejoj o o o o o

Wiesbadena Esperanto-Grupo

Abonejoj de ET

en la landoj

Aŭstrio: Ferd. P. Huber, Mönchsberg 5, Salzburg; por Vieno: „La Esperantisto“ (d-ro E. Pfeffer), Wien I/1, Postamt 34.
Belgio: Frans Schoofs, 45, Kl. Beerstraat, Antwerpen. Poŝtkaste n-o 28430.
Brazilo: Brazila Ligo Esperantista, Praça 16 de novembro, Rio de Janeiro.
Bulgario: Georgi H. Gaševski, Bul. Marie Luiza 46, Sofia.
Ĉeĥoslovakio: Otto Sklenka, Hradec Králové, Otio Lumpe, Trautenau.
Estonio: Est. Esp. Unuiĝo, poŝtkast. 6, Tallinn.
Finna: O.Y. Movado A/B., Kasarminkatu 20, Helsinki.
Germanio: Esp. Centra Librejo, 51 rue de Clichy, Paris 9.
Hispanio: Konrado Doménech, Caldes de Malavella, prov. Girona, Vichy
Catalun.
Hungario: Paŭlo Balkányi, Helos-utca 15-II-2, Budapest VI.
Japanio: Morizo Gō, 16-V, Kitamachi, Aojama, Tokio.
Jugoslavio: D-ro Dušan Maruzzi, Zagreb, jezuitska ul., br. 1.
Latvio: Talivaldo Indra, Riga, Paeta kaste 47b.
Litovio: Paŭlo v. Medem, Smellu g-ve 12, Kaŭnas (Kovno).
Nederlandio: J. Ravestein jr., v. Aerssenstraat 200, 's-Gravenhage. (Poŝt-
ĉeka konto Haag n-o 2878.)
Polo: Adolfo Oberfornik, Krak.-Przedm. 10, Warszawa. (P.K.O. n-o 3125).
— Pola Esp. Servo (Fr. Prengel), Kordeckiego 1a, Bydgoszcz-
Bromberg.
Rumanio: Esperanto-Oficejo Cluj.
Rusio: Mikaelo Valentinov, Cudovskoj per. 6, Komitato de Esperantistoj
SVJAZL.
Svedio: Förlagsföreningen Esperanto, u. p. a., Stockholm 1.
U. S. A.: The Esperanto Service Corporation, 500 Fifth Avenue, New
York City.

S-o Vincento Orlando, str. Santa Fé 77, Bahia Blanca, Argenti., deziras interŝangi poŝtmarkojn kun la tuta mondo kaj korespondi letere kun fratinoj.

S-o Filipp Višnjakov, Novonikolaevsk (gub.), do vostrebovanija, Siberio, interŝangas Esperantajn librojn, lernolibrojn, gazetojn, ĵurnalojn ktp., papermonon, poŝtkartojn ilustr.; petas aboni por li ET dum jaro 1922, rekomencos per dezirataj aĵoj aŭ per ia ruslanda Esp. eldonaĵo.

Geo J. Kvejtman, Łódź, Polio, Przejazd 14, deziras korespondi per poŝtkartoj ilustr. kaj leteroj kun la tuta mondo; interŝangas gazetojn (sportajn), papermonojn ktp.

Fritz Lehmann, landa policoficisto, 12. Hu., Plauen i. V., Germanujo, Neudorfstr. 175, deziras korespondi kun ĉiulandaj gesamideanoj per ilustr. poŝtkartoj kaj leteroj; interŝangas poŝtmarkojn.

S-o Angel Di Santi, str. O'Higgins 90, „La Capital“, Argenti., interŝangas poŝtkartojn ilustr.

S-o Arkadio Kostanov, Katoliceskaja 5, Astrakan, Rusio, deziras korespondi kun la tuta mondo.

Filatelistoj! Postulu mian konkurancan prezaron! Aĉeto, vendo, interŝango. Elektio kontraŭ antaŭpago. — E. Staněk, Praha-Smichov, poŝta fako 10, Ĉeĥoslovakio.

S-o Augustinus deziras ŝangi poŝtmarkojn kaj fotografetojn kun ĉiuj landoj. Adreso: Maarten Harperts, Trompstr. 23, Sloten (N. H.), Hollandio.

S-ino Vera Katovskikova en Tambov, Dubovaja 37, Rusl., deziras korespondi pri diversaj temoj per ilustr. poŝtkartoj.

F-ino Olga Kručkova en Tambov, Kambarovskaja 66, Rusl., deziras korespondi per ilustr. poŝtkartoj pri literaturo, vivkulturo, virina egaleco.

S. Bogojavlenskij, Lossi plats n-o 8, krt. 2, Tallinn, Estonujo, interŝangas poŝtmarkojn, precipe kun balkanaj ŝtatoj.

Francisko Bischof, Wien 8, Blindengasse 28, deziras interŝangi poŝtmarkojn kun ĉiulandanoj, tutaj seriojn kontraŭ tutaj serioj. Afranku filatelistoj!

Astrachani, Armianskij most 111, G. Artemjev, Rusio, deziras korespondi letere kun ĉiulandaj gesamideanoj pri ĉia temo. Interŝangas poŝtmarkojn, ilustr. poŝtkartojn, Esp. gazetojn, literaturojn, afiŝojn, fotografetojn de gesamideanoj kaj aliajn Esperantajn. Deziras ricevi komercan informojn, prospektojn, katalogojn por Komerca Oficejo.

S-o Anatolio Volohev, Kambarovskaja 48, Pambov, Rusujo, deziras korespondi.

Heinz Bayer, komercisto, Saalfelden, Salzburg, Aŭstrio deziras vendi sian riĉan kolektaĵon de helpmono.

Esperantistoj!

Fotografistoj!

Uzu nur Fotochema-platojn!

Absoluta klareco,
treaga empresebleco, subtillega
modulacio estas la supereco de tiu ĉi marko.

Ni serĉas reprezentantojn en ĉiuj kulturŝtatoj.

Fotochema, fabrikejo de sekaj platoj, soc. k. lim. gar., Hradec Králové
Ĉeĥoslovakujo. Fondajo Kč. 6 000 000.— Ĉeĥoslovakujo.

Teerag, akc. soc.,

fabrikadas produktaĵojn el ŝtonkarba gudro.
Hradec Králové, Ĉeĥoslovakujo.
Telefona numero: 75.

Specialaĵoj:
Gudra kartona kovraĵo. — Nia speciala kartonkovraĵo „Teeragolit“. — Distillita gudro. — Peĉo el ŝtonkarbgudro. — Benzolo kruda kaj purigita. — Solvanta nafto. — Karbolino. — Acido karbola kruda. — Vinflava acido karbola. — Sublimita naftalino (ilo kontraŭ tincoj).

Nürnberg.

ET intencas eldoni en oktobro aŭ novembro 8-paĝan ilustritan numeron pri la urbo de la XV-a Universala Kongreso, en eldonkvanto de ĉ. 12 000 ekzempleroj, por veki en plej vastaj rondoj la intereson por la venontjara kongresurbo.

Jam nun ni atentigas la tutmondan komercistaron kaj industristaron je tiu favora okazo por reklami pri siaj entreprenoj en ĉiuj sferoj de la Esperantistaro.

Ni intencas dividi la anoncan paĝon de tiu ĉi numero en ĉ. 64 anoncaj kadroj, el kiuj ĉiu havos ĉ. 20 centimetro-kvadratojn. La prezo de unu kadro estos 3 sviz. fk. aŭ egalvaloro (antaŭpago); por malbonvalutaj landoj 2 fk. (Germanlando, Aŭstrio, Hungarujo, Ruslando, Balkano, Baliko). Ĉe mendo de 4 kadroj ni konsentos rabaton de 10%, de 8 kadroj (okona paĝo) 20%, de 16 kadroj (kvarona paĝo) 25%.

Al kolektantoj de anoncoj ni konsentos rekompencon de 33 1/3 %, t. e. unu triono de la pagota sumo; ĉe kolektado de minimume 4 kadroj 40%.

Ni petas komenci jam baldaŭ la kolektadon, por ke la anoncoj alvenu ĝustatempe, kaj por ke ne okazu, kiel ĉe nia 100-a numero, ke pli ol tuta paĝo da anoncoj alvenis tro malfrue, tiel ke ili ne plu povis aperi en la 100-a numero.

AMFITRIONO

Komedio de Molière.
Esperantigis Enrique Legrand
Prezo: 3 Frankoj.

Centra Esp. Oficejo, 51, rue de Clichy, Paris

Jus aperis
ne esa por propagando kaj Kursoj
Kompletny Podrecznik
języka międzynarodowego
Esperanto
Verkita de Leo Turno.
72-paĝa kun antaŭparolo de Bronisław Kuhl.
La prezo 250 pol mk.
Al mendantoj de alm. 25 ekz. konvena rabato.
Ricevebla nur post antaŭa pago.
La adreso:
Leon Schlichtkorn, Kraków, Pol., Długa 15.
Postulu paskazan transpagilon.

Anoncetoj.

Familial anonceto senpage. Aliaj anoncetoj (nur akceptataj por minimume de 100 ekzempleroj) kostas po du enprezoj kaj po 20 vortoj (krom unu adreso) 0.20 dol., 0.30 fl., 1 nord. kr., 1 šv. fk., 1 pes., 2 franc. aŭ belg. fk., 3 lit., 7 mk., 8 kc., 120 gmk., 120 hung. kr., 600 pmk., 2000 aŝtr. kr. Ĉiu povas pagi per la alia la nomita valuto, sed laŭ la aktuala kurzo de sia propra valuto, aŭ 5 atemp. resp.-kup. Anoncaĵoj, kies valuto ne estas nomita, povas pagi egalvaloron de 2 franc. fk. Ĉe rektaj abonantoj ni deprenas la pagon por anoncetoj laŭdeziro de la abonkanto, de aliaj ni deprenas anoncetojn nur post antaŭpago. — Anoncetoj devas alveni al ni en presita formo, aŭ almenaŭ en formo de listo, aŭ en formo de listo de 10 tagojn antaŭ publikigo. — Adresojn monbiletojn ni akceptas nur de 1000 kr. aŭ pli, polajn de 100 mk. aŭ pli.

AL MIAJ AMIKOJ! — Mi transloĝiĝis, kaj mia nova adreso estas: Anni Nora Pickert, Hohenelbe, Neustadt 555, Bohemi.

ELDONEJO „ESPERANTISTA VOĈO“ (posedanto: Salo Grenkamp-Kornfeld), Jasio, Pollando, liveras ĉiujn Esperantajn librojn. Petu prezaron! Liveras ankaŭ ĉiujn poŝtmarkojn plej malkare. Kontraŭ referencoj aŭ deponita mono forsendas poŝtmark-elektojn.

„DANA ADRESEJO“ por komercio, industrio, reklamo ktp. informas pri ĉiu afero, kontraŭ respond-kuponon. — Lendorff, Dybbølsgade 55, Kopenhago B.

RUSAJ SAMIDEANOJ! — Kiu scias ion pri la nuna sorto de Johan Ocsfolsky, hungera militkapitulo, kiu laboris ĉe Jakob Vasil Voronkin en Staropolska Huberni, Nikolekt-dorf (Kaŭkazo)? De 1917 nenion aŭdis pri li liaj gepatroj. — Bonvolu skribi al Francisko Lerch, str. N Jorga n-o 8, Rumanio, urbo Petroŝeni.

5000! — Jen la eldonkvanto provizore aspirata de ni por ET. Se ĉiu abonanto de ET verbas nur unu plian abonanton, la eldonkvanto jam estos 7000.

JUNA BANKOFICISTO ne maldungiĝis, fraŭle, serĉas pozicion por tuj aŭ pli poste. Scipovas germanen, anglan, francan, Esperantan lingvojn. Bonvolu adresi: s-o L. Funken, Floriansmarkt 7 a. l., Koblenz, Germanlando.

SUDITALIO. — Ĉiulandaj samideanoj, kiuj trovas aŭ konas publikajojn lamaniere rilatantaj al Suda Italio (precipe regionoj de Napoli, Basilikata, Kalabria), bonvolu havigi al mi detalajn informojn kaj resumojn Esperantlingve. Tuj ĉi samideanojn, kiu elfikas propagandon de ni kara lingvo, mi pagos aŭ rekomencos laŭdeziro. — Fidia Cesarini, del. UEA, Polenza (Italio).

DE MALNOVAJ ET-numeroj (malgranda formato) ni posedas nur kelkajn ekzemplerojn 1 (Spec.), 5, 8, 9, 24, 25, 26, 27, 28, 30, 33, 34, 35, 37, 42, 48, 49, 52, 53, 54. Aliaj n numerojn inter 1 kaj 54 ni serĉas! Por nedifektaj puraj ekzempleroj ni enskribas en la abonkonton po 1-3 novaj numeroj. Oni serĉu ĉe antaŭe abonintoj! Speciala ni deziras en 18. — Al la serio de ET.

GRAVA INFORMILO por ĉiuj korespondantoj kaj kolektantoj BES-a ADRESARO. Nova, kvara eldono. Prezo: 150 sviz. fk. Por germanoj kaj malbonvalutuloj 80mk. afrankite. — Tuj sendado post pago. Havebla ĉe Esperanto-Eldonejo Buijn & Jung, Godesberg (Germ.).

GELABORISTOJ! — GEIDEALISTOJ! — Ĉiuj, kiuj volas lerni pri loko en Usono, kie sinjor(in)o kun familio povas vivi tiel malkoste kiel fraŭl(in)o sen dependantoj; kie ne estas bezono de asekuro; kie infanoj instruiĝas sian devon al la prahomaro laboranta; kie manko de zorgo pri vivrimedoj ebligas grandan kreskon mensan, moran kaj korpan; kaj kie estas nek riĉeco nek malriĉeco; kie la ora regulo estas la sola leĝo — ĉiuj, kiuj akceptas „Homidaro“ kiel dio de sia laboro, devas skribi sian adreson legeble sur poŝtkarto kaj adresu al E. A. Young, Balboa Heights, Kanala Zono, Istmo de Panamo, Ameriko.

FRUITEMPE verbu anoncojn por la speciala numero de ET pri Nürnberg. Legu la kondiĉojn je alia loko en la hodiaŭa numero!

SKOLTOJ. — Skolta grupo „Iroquois“ deziras interrilati kun skoltoj ĉiulandaj. Skribu al Jiri Frankenberg, YMCA, Praha, Národní tr. 14, Ĉeĥoslovakio.

ROZOLEO bulgara unuakvalita, ŝtate garantiita, pogranda kaj pomalgranda. Specimena luksa boletejo kontraŭ 1 dolaro, 5 svizaj aŭ fr. fk. antaŭpago ĉe reprezentanto de Rozolea Fabriko: Iv. Krestanoff, Wintergartenstr. 9, Dresden A. 16, Germ.

KOMERCA Ekspori-Importa Oficejo en Dresden A 16, Wintergartenstr. 9-1, Germanio, serĉas interilatojn kaj petas ofertojn. Koresp. en Esp., germana, franca, rusa kaj bulgara. Generala reprezentanto de la Bulgara Komercio kaj Industria Almanako.

OKUPO SERĈATA. — Bonkoraj samideanoj! Fervora, malriĉa Esperantisto 21-jara serĉas iun ajn okupon (escepte de taglaboristo), ekz. kiel servisto, skribisto ktp., en eksterlando. Afablajn proponojn oni direktu al Zajč Franz, Pflvoz, Krausgasse 125, Moravio, Ĉeĥoslovakio.

HIGIENAJN KAJ HIRURGIAJN KOMERCAĴOJN el mola kaj malmola kaŭĉuko oni aĉetas ĉe Alfred Feller, Wien I, Sonnenfelsgasse 11, Aŭstrio. Korespondas anglie, france, germane, italie kaj Esperante.

Korespondeo kaj Interŝango.
S-o Fernand La Gravière, 11 Boogstraat, Antwerpen, Belgujo, deziras interŝangi Esp. sigelmarkojn kun ĉiuj landoj kaj ilustr. poŝtkartojn (bfl.) kun Ekster-Eŭropo.

Paperhelpmono. — Mi vendas paperhelpmonon de Germanlando kaj Aŭstrio. Sendu al mi respond-kuponon kaj mi sendos seriojn da helpmono. — H. Frye, Bremen, Germ., Oldenburgerstr. 4.

S-o Laurent Bruhy, rue Biolly n-o 1, Verviers, Belgujo, deziras korespondi per leteroj kaj ilu str. poŝtkartoj (bfl.) kun ĉiulandanoj.

S-o Lidjard, Glencroft, Grenfell Road, Maidenhead, Anglujo, deziras gekorespondantojn ĉeajn por siaj kursejoj (plenajuloj, komencantoj), komence poŝtkarte.

S-o Karel Van Berendonck, Kattenberg 10, Bergerhout-Antwerpen, Belgio, deziras korespondi kun ĉiulandaj gesamideanoj per leteroj kaj ilustr. poŝtkartoj (bfl.).

Serioza interŝangado kaj vendado de poŝtmarkoj laŭ katalogo Michel, Senf. — Lichtmann Nandor, Miskolc, Hungarujo, Szemere utca 27.

Karlo Koči, studento, Velky Osek u Kolina n/L., Bohemio, Ĉeĥoslovakio, deziras korespondi per leteroj kaj poŝtkartoj kun gesamideanoj el la tuta mondo.

S-ino Kaisa Lingman, Pori, Järnefeltink. 23, Finnlando, deziras korespondi per ilustr. poŝtkartoj aŭ leteroj kun ĉiulandanoj (fremdlandanoj) Esperantlingve.

Filatelistoj! — Soleri Luigi. V. Amandoria 5-9, Genova, Italio, deziras interŝangi poŝtmarkojn kun seriozaj filatelistoj.

Kiu sendas 50-100 poŝtmarkojn de sia lando, ricevos la saman kvanton belajn de s-o R. Van Rompaey, Berthoustraat 27, Berchem-Antwerpen, Belgujo.

Otto Nitsche, Berlin, Petersburger Str. 46, sendas tuj 100 germanajn poŝtmarkojn por la sama kvanto de alia lando.

S-oj Lucien Etienne 26 rue Fazillau, Paul Corbaon, 44 rue Fazillau, kaj Lucien Talenton, 60 rue Fazillau, ĉiuj en urbo Levallois-Perret (Seine), Francujo, deziras korespondi kun la tuta mondo per poŝtkartoj ilustr. (bfl.)

Antonio Costa, Rua do Carrião 22, Lisboa, Portugalujo, deziras korespondi poŝtkarte aŭ letere kun ĉiulandaj gesamideanoj.

Fraŭlo Wäinö Häkkinen, Viipuri, Saimaan Piirikonttori, Finnlando, deziras korespondi per leteroj kaj poŝtkartoj ilustr. kun ĉiulandanoj.

40-50 diversajn ĉiulandajn poŝtmarkojn mi sendas por la sama kvanto vialandaj: Zuber, Trautenau, Elektrastrasse 7, Ĉeĥoslovakio.

S-ano Felikso Jašsoro, Irala-Barri, Villa Fica, Bilbao, Hispanujo, deziras interŝangi ilustr. poŝtkartojn kun samideanoj de ĉiuj landoj.